poste turnis sin denove al la Gliro kaj ripetis la demandon:

" Pro kio ili loĝis en la putfundo?"

Jam la duan fojon la Gliro bezonis duminutan konsideradon; fine li diris: "La puto estis melasa puto."

" Neeble, ne ekzistas tiaĵo" Alicio komencis tre indigne. Sed la Ĉapelisto kaj la Martleporo ambaŭ sible admonis ŝin per Ŝ—! Ŝ—! kaj la Gliro mem per ofendita voĉo minacis ŝin, dirante:

" Se vi ne kapablas konduti ĝentile, vi devas mem fini la fabelon."

" Ho, volu daŭrigi, mi petegas" Alicio ekkriis. "Mi ne ree interrompos vin; eble ekzistas *unu*."

" Vi kredas ke nur unu?" la Gliro indigne ekkriis. Tamen li konsentis daŭrigi.

" Do, tiuj tri fratinetoj—ili ja lernis la desegnarton——"

" Kion ili desegnis?" diris Alicio, jam forgesinte sian promeson.

Ĉi tiun fojon eĉ ne unu momenton la Gliro konsideris.

" Melason" li diris.

— "Mi bezonas puran tason" interrompis la Ĉapelisto. "Ni ĉiuj movu nin maldekstren je unu sidloko."

Li movis sin laŭ la diro; lin sekvis la Gliro, kaj la Martleporo translokigis sin en la seĝon de la Gliro. Alicio, ne tre volonte, prenis la antaŭan lokon de la Martleporo. El la ŝanĝoj ja profitis nur la Ĉapelisto, kaj ĉar la Martleporo ĵus antaŭ la translokiĝo renversis la laktokruĉon en sian teleron, Alicio certe malprofitis.—

Ĉar ŝi ne volis reofendi la Gliron, ŝi komencis tre singarde:

" Mi ne komprenas. De kie ili desegnis[1] la melason?"

" Oni povas ĉerpi[1] akvon el akvoputo" la Ĉapelisto klarigis "do egalfacile estas ĉerpi (t.e. desegni) melason el melasoputo, ĉu ne? vi malklera bubineto?"

Alicio pro lia malĝentileco tute ne atentis la Ĉapeliston: al la Gliro ŝi diris:—

" Sed ili ja vivis en la puto."

" Vivis en la puto? Certege! Sed *vi, vi sen la puto* ja malsukcesus desegni la melason el ĝi!" La Gliro, dirante tion, tre longigis la vokalojn, kaj iom kunligis apartajn vortojn laŭ la parolmaniero de kelkaj angloj kiuj eklernis la lingvon en tre malmoderna epoko.

Alicio tiel konfuziĝis per tiu respondo ke, dum kelka tempo, ŝi lasis al la Gliro seninterrompe daŭrigi la rakonton.

[1] la sama angla vorto "*draw*" havas la signifojn "desegni" kaj "ĉerpi."